



Jaro III

Beogrado, majo-aŭgusto 2008

n-ro 2(6)

### LONGE ATENDITA OKAZAĴO

Oni longe atendis, sed nun fine okazis

#### **la 1- kongreso de serbiaj esperantistoj**

de la 1-a ĝis la 4-a de majo ĉi-jare en Niŝka Banja. La organizantoj, Serbia Esperanto-Ligo, Esperanto-Instituto kaj la urba Esperanto-societo el Niŝ, organizis diversajn aktivecojn. La partoprenantoj de la kongreso konstatis, ke dum la lastaj jaroj la Esperanto-movado en Serbio bone funkciis, sed, bedaŭrinde, inter esperantistoj estas malmulte da gejunuloj.

Dum la kongresaj tagoj oni prezentis kelkajn librojn: **Vortaron** (Esperanto-serba kaj serba-Esperanto), tradukon de la lernolibro de Stano Marĉek "Esperanto - direkta metoda" en la serban, novan numeron de "Beograda Verda Stelo", informa kaj literatura revuo kiu, en modesta formo, jam la trian jaron aperas, kaj tradukon de la romano de vojvodina hungarlingva verkisto Nandor Gion al Esperanto "Salvo al nigra bubalo".

Pli pri la kongreso vi povas legi en la rubriko *Movado*.

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado  
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumentoj  
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),  
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko  
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)  
Aperas trifoje jare

---

**Ĉefredaktoro:** d-ro Miodrag Stojanović,  
**Redakta komitato:** d-ro Pri-bislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa  
Eremija, Mirjana Šundeke, Eteka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista,  
Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilj-ković, Branko Despotović, Dimitrije  
Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Veli-bor Simović, Milan Olbina,  
**Teknika redakto:** Adem Jakupović

# Originala poezio

Nedeljka Subotić

## AMIKO

Ĉu gravas,  
ke mi neniam vin vidis  
kaj, eble,  
eĉ neniam mi vin vidos?

Tamen ni ankoraŭ longe  
kune ridos,  
ploros kaj ĝojos.  
Ni konsolos unu la alian,  
vi rakontos al mi  
vivon vian,  
kaj mi al vi la mian.

Mi estas pli aĝa ol vi,  
aŭ vi pliaĝas, eble,  
sed kompreneble,  
vi pravas  
dirante, ke tio  
ne gravas.

Vi estas doktoro  
aŭ laboristo  
mi profesoro  
aŭ pentristo.  
Denove vi pravas:  
ankaŭ tio  
ne gravas.

En mia lando nu brilas la suno  
kaj en la via

la ĉielon ornamas la luno,  
vi estas japano,  
norvego aŭ italo,  
mi dano,  
ruso aŭ portugalo.  
Ankaŭ tio  
tute, tute ne gravas,  
ĉar malgraŭ ĉio  
bonaj amikoj ni estas.

Kaj  
– tion provus la vivo –  
bonaj amikoj ni restos.



# Tradukoј

Иво Андрић

## ДЕЦА

Наш друг, проседи инжењер, причао нам је једне вечери ово сећање из свога детињства:

»Била је Велика недеља. Деца не воле то претпролећно време, кад је земља још пуста и гране голе, кад нема ни снега ни цвећа ни воћа, ни зимских игара ни купања. У такве дане, клатећи се на комшијским тарабама и жмиркајући на мартовском сунцу, ови мали људи измишљају нове, често чудне и свирепе игре.

Дечје вође из нашег сокака били су неки Миле и Палика. Миле је био пекарев син, блед, оштар, са лицем сувише израђеним за његове године. Палика је био буцмаст и румен, Мађар по оцу, па иако је био рођен у тој истој улици у којој и ми остали, имао је неки отегнут и тежак изговор, као да су му уста пуна теста. Њих двојица су вадила жестоке борбе са вођом дечака из суседне махале. То је био неки наш вршњак, Стјепо Боро, који је већ стигао да изгуби једно око. Ми остали били смо војска, нестална и недисциплинована, али борбена и грлата. Као у свакој борби, и ту је било привржености и храбрости, колебања и неверства, суза, крви, издаје и заклетви. Готово свако предвече, док смо седели испупљени око камените чесме, прилазиле су вође понеком од нас; одводиле га у страну, и озбиљним, муклим гласом постављале му питање:

– Јеси ли ми друг?

Једнога од тих пролећних дана, био је Велики четвртак, у једно такво предвече позваше ме Миле и Палика да сутра после подне идем с њима да бијемо Јевреје. На те експедиције у јеврејске махале ишло се само неколико пута преко године, редовно о нашим или јеврејским празницима. За мене, који дотад нисам никад учествовао у таквим подвизима, била је то велика почаст од стране двојице вођа.

Мислим да сам сутрадан ручао на брзину и са узбуђењем. Кренули смо одмах после ручка. Пре него што смо се спустили низ брег и прешли реку, зауставили смо се на једној раскрсници. Сели смо на велику углачану камену плочу, и ту су Миле и Палика са много пажње и разумевања разгледали наше оружје. Палика је имао неки чудан ловачки штап, који је он поковао клинцима и зашиљио на врху. Миле је имао нарочито оруђе које је сам направио. То је била нека цев од гуме, коју је он при дну напунио оловом а на другом крају везао канапом око ручног зглоба. Поносио се тим витким штапом од гуме и олова и звао га је »будалаш«. Он је и сада, онако хладан и оштар, био нагнут над својим оружјем и дотеривао га малим ножићем.

Мени су дали једну заломљену летву, откинуту малочас од неких тараба; на њој је при доњем крају још вирио клинац којим је била прикована за жиоку. Ја сам се стидео свога оружја, које ми је изгледало простачко и недовољно. Миле ми је узео летву, одељао је вешто на крају где се држи руком и замахнуо њоме неколико пута око себе, са фијуком. Учинио сам одмах за н»им то исто, али фијук није био исти као код Мила.

Спустили смо се у улицу где се обично сачекују јеврејска деца ради туче.

– Њихов је празник. Они сада иду око воде – говорио је Палика са искуством и зверајући опрезно као ловац.

Али Јевреја није било. Љутито и заповеднички, Миле је предложио да пређемо у Чаршију. Већ у првој улици Палика застаде и викну пригушено:

– Ено Чифучади!

Заиста, у дну улице, око камените чесме играла су се четири дечака у празничном оделу.

Миле га само прекорно погледа и даде знак да идемо за њим и радимо што и он. Он је сакрио своју цев од гуме иза леђа и ишао полагао, правећи се као да загледа куће и дућане. Тако смо се примицали чесми. Али, било да нас је одавао наш изглед, било да су јеврејска деца већ навикла на такве посете, она се узнемирише, као срне на шумској чистини и склонише се за чесму. Мени је срце тукло нагло. Гледао сам нетремице Палики у потиљак. Да завара противнике, Миле се правио као да ће проћи другом страном улице, а кад га је од њих делило свега неколико корака, он викну

неочекивано снажно и оштро, и јурну на њих. У први мах је изгледало као да су дечаци решени да се бране, али кад он удари својом страховитом цеви првога по руци и кад видеше да смо и ми притрчали, настаде дивље бежање на све стране.

Разбежаше се дечаци, али ја нисам толико гледао њих колико нагли покрет којим је Миле искочио из оног притворног мира и одједном се претворио у нешто ново и непознато. Потпуно одвојене од њега, видео сам и чуо његов ударац и његов узвик. Осетио сам их као ствари за себе, као прве појаве мени непознатог, великог, узбудљивог, страшног света у ком се носи кожа на пазар, у ком се дају и примају ударци, мрзи и ликује, пада и побеђује – једног света у ком сам само наслућивао непознате ризике и неке велике, сјајне тренутке.

За дечацима се дадоше у трк Миле и Палика, а ја за њима. Тројица дечака успеше да упадну у капије својих или туђих кућа, из којих се одмах за нама осуше вриска и клетве јеврејских жена. Четврти, најкрупнији, бежао је као обневидео из улице у улицу, док се не изгуби иза неког белог зида. Кад сам ја пристигао, Миле и Палика су га већ тражили по великој влажној авлији, као керови.

Били смо у неком напуштеном, рушевном мектебу. Прођосмо кроз средњи ходник и спустисмо се низ неколико натрулих басемака у једну мању, четвороугаону авлију. Са све четири стране висок зид. Осим врата на која смо ушли, само још у противном зиду једна мала врата, као капиџик, очигледно затворена или закована одавно. У једном ћошку неке позеленеле даске, остатак од неког крова, прислоњене уза зид и подигнуте доњим крајем на једну греду. У простору који је остајао од греда до земље, отприлике један добар педаљ, ја угледах нечије две ципеле, непомичне и грчевито припијене једна уз другу. Понесен том чудном хајком, дозвох Мила знаком и указах му поносно прстом на моје откриће. Не гледајући мене, него укоченим погледом у оне ципеле, пришапну ми да останем ту на улазу и да не дам дечаку на врата. Он и Палика сиђоше са последњег басемака у авлију. Палика се, опет на нему заповед Милову, упути оним малим затвореним вратима и ту стаде раширених ногу и подигнуте тољаге. Одмах заузех и ја такав став.

А Миле се примицао оној гомили дасака неким ратничким ходом, не скидајући очију са циља. Тај његов нечујан корак и оштро уперен поглед изгледали су ми страшнији и узбудљивији од сваке трке и туче. Али пре него што је он стигао да се примакне, јеврејски

дечак прхну из свог заклона као птица из жита и поче да бежи по авлији.

Палика, који је опробао мала врата и видео да су затворена, сиђе такође у авлију. Отпоче јурњава и вијање, у ком је дечак натрчавао час на Паликину тољагу, час на Милову цев од гуме. Али ниједанпут нису успели да га ударе по глави или по леђима. Захватили су га само скраја, по рукама или ногама.

Палика је више трчао. Миле је стајао као сељак на гувну и гледао да дочека ударцем жртву кад му је Палика натера. У тој јурњави помицали су се сви ближе мени.

Тако се око уловљеног дечака све више стезао троугао од летве, тољаге и гумене цеви. Сад сам могао да га видим изблиза. Био је у новом јевтином оделу, мокар и каљав од заклона под даскама, угојен и кратак, без капе на коврчастој коси. Противно од Милових, његови покрети нису имали за мене ничег ни страшног ни узбудљивог. Кретао се одједном целим телом, безглаво, и летео као бачен.

У једном тренутку, кад га је Палика пристигао и кад је требало да удари посред главе, јеврејски дечак се неочекивано и некако комично сагну и баци свом тежином Палики у груди. Тако је избегао ударац. Миле притрча. Настаде гужва. Док се Палика прибирао, дечак искористи тренутак, откиде се од њих, устрча оно неколико басамака и нађе се одједном лице у лице са мном. За један трен ока видех га пред собом, са уздигнутим рукама, једна му подланица сва у крви, са забаченом главом као код самртника. У том тренутку угледах први пут његово лице. Уста му напола отворена, усне беле, очи без погледа, разливене као вода, без икаква израза више, и одавно избезумљене. Ту је требало ударити.

Шта се тада десило? – Колико сам пута поставио себи то питање и тих дана и доцнијих година. И никад нисам могао дати одговора.

Колико сам после могао да се сетим и просудим, дечак се малко сагнуо (био је то онај исти покрет за одбрану као малочас према Палики), одгурнуо ме лагано, додирнувши ме оном неповређеном руком у слабину, отклонио ме као најлакшу завесу, и протрчао са тутњем кроз узак ходник, поред мене непомична и поред моје уздигнуте летве, којој је на крају стрчао оштар и велики клинац.



Прибрао сам се тек кад су поред мене протрчали, одгурнувши ме грубо и презриво, Миле и Палика. Стајао сам још на истом месту и слушао као у сну како под њиховим ногама још јаче одјекују поднице у ходнику. Затим сам изишао полако, вукући своју летву као терет. У дну улице видео сам Мила и Палику како трче. Охрабрено Јеврејче било је измакло. Трчали су још мало, па застадоше, прво један па друга. Нешто су разговарали једно време, а затим кренуше путем којим омо били дошли, не обзирући се на мене. Пођох за њима. Пре него што су дошли до моста, стигао сам их. Ишао сам тако иза њих, али су се они. правили да ме не примећују. Тај ме положај мучио. Заустих нешто да кажем.

– Куш! – прекиде ме Палика.

И на све моје покушаје да се правдам, да кажем ма шта, он је одговарао хладно и гневно својим: куш! Горе од те псовке бринуло ме и мучило Милово ћутање. Тако смо прешли мост и примицали се нашој махали. Ишао сам два корака иза њих, увиђајући и сам колико сам глуп и смешан. Смишљао сам непрестано шта би требало казати и како се објаснити. Можда сам у том размишљању и гласно рекао неку реч. Тада се Миле нагло заустави, окрену се и, пре него што сам могао ишта да кажем или учиним у своју одбрану, пљуну на мене, засу ме свега пљувачком. Да ме је ударио својом цеви од гуме, вероватно бих се мање збунио и можда знао како да се браним или да му вратим ударац. Овако, стајао сам на сред улице и брисао се рукавом, док су њих двојица одмицали, како се мени чинило, невероватно брзо. Изгледало је да они лете, а да време стоји.

Мали људи, које ми зовемо »деца«, имају своје велике болове и дуге патње, које после као мудри и одрасли људи заборављају. Управо, губе их из вида. А кад бисмо могли да се спустимо натраг у детињство, као у клупу основне школе из које смо давно изишли, ми бисмо их опет угледали. Тамо доле, под тим углом, ти болови и те патње живе и даље и постоје као свака стварност.

Данас, после толико година и догађаја, тешко је, •немогућно је мером наших садашњих искуства и изразима садашњих осећања казати какве су биле те прве несанице у животу, какве муке и сумње пред презиром вођа Мила и Палике, пред подсмехом целе дечје чете из махале. Сваки покушај да ствар улепшам или поправим испадао је на моју штету и гурао ме у још гора понижења и већу усамљеност. Палика ја причао свима моју бруку и, карикирајући ме,

показивао насред сокака како сам глупо пропустио Чифуче, док су се деца око њега грохотом смејала и правила шале на мој рачун. Миле је само ћутао, и није хтео да ме види ни да чује за мене. Показивали су ме прстом деци из других махала. А ја сам обарао поглед пред свима, сакривао се у школи за време одмора у нужник, и враћао се кући споредним улицама, као прокажен. Код куће нисам могао да кажем ником ништа, ни да тражим заштите или утехе. Чини ми се да сам већ тада наслутио оно што ћу после јасно увидети: да нам у нашим најдубљим душевним мукама наши родитељи мало могу помоћи; мало или ништа.

Пролазили су тако дани а ја нисам губио, чини ми се, ниједног тренутака свест о свом понижењу. Сав мој детињски свет срушио се и, разбијен у комаде, лежао код мојих ногу. Стајао сам над њим немоћан, не разумевајући ништа и знајући само једно: да патим. Стајао сам и нисам знао где да се денем под овим небом, тако осрамоћен, извргнут подсмеху, и сам. Како да одредим свој однос према Милу, Палики и осталим друговима којима бих желео свом душом да будем равноправан друг, али не успевам, а како према јеврејским дечацима које треба, изгледа, нападати и тући, а ја то не могу и не умам?

Најпосле, и то се некако претурило, иако никад нисам успео да нађем одговор на та питања. Измирио сам се мало-помало са друговима. Изгледало је да су ми опростили. Или су само заборавили? Сад се више не сећам. Али ме никад више нису повели на сличне подвиге. А ја сам још дуго памтио цео догађај и понекад га сновио. У сну сам виђао готово увек исто: јеврејски дечак са мученичким лицем протрчава поред мене, лак и незадржив као анђео, а ја га и опет пропуштам без ударца, иако знам унапред шта ме због тога чека. Или: стојим насред улице, попљуван и сам, под немилосрдном светлошћу поподнева, док време стоји непомично а другови се нагло удаљују. Тек доцније, младићке године избрисале су потпуно тај спомен из мога сећања и истисле ту слику из мојих снова. Али то је већ био заборав, смрт детињства.«

## INFANOJ

Nia kamarado, grizethara inĝeniero, rakontis al ni iuvespere ĉi tiun rememoron de sia infanaĝo:

"Estis Sankta Semajno. Infanoj ne ŝatas tiun antaŭprintempon, kiam la tero ankoraŭ dezertas kaj la branĉoj nudas, kiam estas nek neĝo nek floroj nek fruktoj, nek vintraj ludoj nek banado. Dum tiaj tagoj, balancante sur najbaraj bariloj kaj palpebrumante je la martsuno, ĉi tiuj ethomoj elpensadas novajn ofte strangajn kaj kruelajn ludojn.

La infanaj gvidantoj en nia strateto estis iuj Mile kaj Palika. Mile estis bakistfilo, pala, akra, kun vizaĝo tro matura por sia aĝo. Palika estis pufvanga kaj ruĝeta, hungaro laŭpatre, do kvankam li naskiĝis en la sama strato, kie ankaŭ ni aliaj, lia elparolo estis iel trenanta kaj peza, kvazaŭ lia buŝo estus plena de farunaĵo. Ili du gvidis ardajn luktojn kontraŭ la gvidanto de la knaboj el la najbara kvartalo. Li estis nia samaĝulo, Stjepan Ĉoro, kiu jam alvenis perdi unu okulon. Ni aliaj estis soldataro malkonstanta kaj nedisciplinita, sed batalema kaj laŭtvoĉa. Samkiel en ĉiu lukto, ankaŭ ĉi tie estis sindoneco kaj kuraĝo, hezitado kaj malfideleco, larmoj, sango, perfido kaj ĵuroj. Preskaŭ ĉiuvespere, dum ni sidis kolektiĝinte ĉirkaŭ la ŝtonfontano, alpaŝis la gvidantoj al iu el ni, forkondukis lin flanken, kaj per serioza, obtuza voĉo starigis al li la demandon:

– Ĉu vi estas mia kunulo?

Iun el tiuj printempaj tagoj, estis Sankta Ĵaŭdo, dum iu tia fruvespero invitis min Mile kaj Palika ke mi iru morgaŭ posttagmeze kun ili bati la judojn. Al tiuj ekspedicioj en la judajn kvartojn oni iris nur kelkfojojn jare, regule dum niaj aŭ la judaj festotagoj. Por mi, kiu ĝis tiam ne partoprenis en tiaj bravaĵoj, estis tio granda distingo fare de la du gvidantoj.

Mi opinias ke la morgaŭan tagon mi manĝis rapidece kaj ekscitita. Ni ekiris tuj post tagmanĝo. Antaŭ ol ni malsupreniris la monteton kaj trapasis la riveron, ni haltis ĉe iu krucvojo. Ni sidiĝis sur la grandan poluritan platon, kaj tie Mile kun Palika per multo da atento kaj kompreno ekzamenis nian armilon. Palika havis iun strangan ĉasistbastonon, kiun li

plenmetis per najloj, kaj pintigis la supron. Mile havis specialan armilon kiun li mem faris. Tio estis ia gumtubo, kiun li ĉe la fundo plenigis per plumbo, kaj la alian finon per ŝnuro ligis laŭ sia manartiko. Li fieris pro tiu svelta bastono el gumo kaj plumbo, nomante ĝin "pormalsaĝul". Li ankoraŭ nun, tiom frida kaj akra, kliniĝis super sia armilo ĝustigante ĝin per malgranda tranĉileto.

Al mi oni donis iun rompefleksitan laton, ĵus forŝiritan de iu bretbarilo; sur ĝia malsupra fino ankoraŭ videblis la najlo per kiu ĝi estis alfiksita al la breto. Mi hontis pro mia armilo kiu ŝajnis al mi vulgara kaj nesufiĉa. Mile prenis de mi la laton, lerte hakformis la finon kiun oni mantenas kaj eksfingis ĝin kelkajn fojojn, ĉirkaŭ si mem, kun fajfo. Mi tuj faris same post li, sed la fajfo ne estis sama kiel ĉe Mile.

Ni malsupreniris la straton kie oni kutime atendas la judajn infanojn por batalado.

– Estas ilia festotago. Ili nun iras ĉirkaŭ la akvo – diris Palika sperte kaj gapante atente kiel ĉasisto.

Sed judoj ne estas tie. Kolere kaj ordoneme Mile proponis transiri al la komerckvartalo. Jam en la unua strato Palika ekstaris kaj obtuze ekkriis:

– Jen la judaĉidoj!

Vere, funde de la strato, ĉirkaŭ la ŝtonfontano, ludis kvar knaboj feste vestitaj.

Mile lin nur riproĉe ekrigardis kaj faris signon ke ni iru post li kaj faru kion li faras. Li kaŝis sian gumtubon malantaŭ la dorso kaj marŝis lante, ŝajnigante ke li rigardas la domojn kaj vendejojn. Tiel ni alproksimiĝis al la fontano. Sed, ĉu nia aspekto denunciis nin, aŭ la judaj infanoj jam alkutimiĝis al tiaj vizitoj, ili malkvietiĝis kiel kapreolinoj sur senarbejo, kaj retiriĝis malantaŭ la fontano. Mia koro batis fortege. Mi streĉe rigardis la nukon de Palika.

Por trompi la kontraŭlojn, Mile ŝajniĝis pasi sur la alia flanko de la strato, sed kiam li estis nur kelkajn paŝojn de ili, li neatendante fortege kaj akre ekkriis, kaj kuratakis ilin. Unuamomente ŝajnis ke la knaboj decidis defendiĝi, sed kiam li frapis per sia terura tubo la manon de la unua, kaj kiam ili vidis ankaŭ nin alkurantajn, ekestis sovaĝa fuĝo ĉiufanken.

Disfuĝis la knaboj, sed mi ne tiom rigardis ilin, kiom la abruptan movon per kiu Mile elsaltis al tiu ŝajnigita trankvilo kaj subite transformiĝis al io nova kaj nekonata. Tute apartigite de li mi vidis kaj aŭdis lian frapon kaj lian ekkriion. Sentis mi ilin kiel aĵojn por mi mem, kiel la unuajn aperojn de iu al mi nekonata granda, ekscitanta, terura mondo en kiu oni portas la haŭton al la vendoplaco, en kiu oni donas kaj ricevas frapojn, malamas kaj triumfas, falas kaj venkas – de iu mondo en kiu mi nur antaŭsentis la nekonatajn riskojn kaj iuj grandajn brilajn momentojn.

Post la knaboj ekkuregis Mile kaj Palika, kaj mi post ili. Tri knaboj sukcesis bruske eniri en la pordegojn de siaj aŭ aliaj domoj, el kiuj tuj ekaŭdis akraj kriadoj kaj malbenoj de la judaj virinoj. La kvara, la plej dika, fuĝis kiel blindiĝinta de strato al strato, ĝis kiam li perdiĝis, malantaŭ iu blanka muro. Kiam mi alvenis, Mile kaj Palika jam serĉis lin en la granda malseka korto kiel hundoj.

Ni estis en iu forlasita, ruinigita mektebo\* (\*mektebo – muzulmana religia lernejo). Ni trairis la mezan koridoron kaj malsupreniris laŭ kelkaj duonputritaj ŝtupoj en malgrandan kvarangulan korton. De ĉiuj kvar flankoj alta muro, krom la pordo tra kiu ni eniris, nur en la kontraŭa muro malgranda pordo, kiel ĝardenpordeto, evidente fermita, aŭ najle fiksita de antaŭ longe. En unu angulo verdiĝintaj bretoj, restaĵo de iu tegmento, apogitaj al la muro kaj leviĝintaj per unu fino al iu trabo. En la spaco restanta de la trabo ĝis la tero, ĉirkaŭ unu granda manlarĝo, mi ekvidis du ŝuojn de iu, senmovaj kaj spazme alpremiĝintaj unu al la alia. Ekkaptita de tiu stranga pelado, mi alvokis Mileon per signo kaj fierece per fingro indikis mian eltrovon. Ne rigardante min, sed per ridiĝintaj okuloj la ŝuojn, alflustris min ke mi restu tie ĉe la enirejo kaj ne permesu al la knabo atingi la pordon. Li kaj Palika descendis de la lasta ŝtupo en la korton. Palika, do, je la muta ordono de Mile, direktiĝis al tiu fermita pordeto, kaj tie ekstaris kun disedentitaj gamboj kaj levita bastonego. Tuj ankaŭ mi prenis tian pozicion.

Kaj Mile alproksimiĝis al tiu bretamaso per ia lanta militista marŝo, ne mallevante la okulojn de la celo. Tiu lia neaŭdebla paŝado kaj akre fiksita rigardo ŝajnis al mi pli teruraj kaj pli ekscitantaj ol ĉiu vetkurado aŭ batalado. Sed antaŭ ol li sukcesis alpaŝi, la juda knabo elflugis de lia ŝirmejo kiel birdo el tritikkampoj kaj komencis kuri tra la korto.

Palika, kiu ekprovis la pordeton kaj vidis ĝin fermitan, descendis same en la korton. Ekestis kuregado kaj persekutado, dum kio la knabo

alkuris jen al la bastonego de Palika, jen al la gumtubo de Mile. Sed eĉ unu fojon ili ne sukcesis frapi lian kapon ol la dorson. Ili trafis lin nur ekstreme, al manoj kaj gamboj. Palika kuris pli. Mile staris kiel kamparano sur draŝejo kaj rigardis kie ĝisatendi per frapo la viktimon, kiam Palika lin alpelos. Dum tiu kuregado ili ĉiam pli alproksimiĝis al mi.

Tiamaniere ĉirkaŭ la ekkaptita knabo ĉiam pli kuntiriĝis la triangulo de lato, bastonego kaj gumtubo. Nun mi povis vidi lin de proksimeco. Li estis en nova malmultekosta vestaĵo, humida kaj kota de la rifuĝejo sub bretoj, grasa kaj malalta, sen ĉapo sur la krispa hararo. Kontraŭe al tiuj de Mile, liaj movoj signifis por mi nenion teruran nek ekscitantan. Li moviĝis samtempe per la tuta korpo, senpripense, kaj flugis kvazaŭ ĵetita.

Unumomente, kiam Palika atingis lin kaj kiam estis fraponta lin meze de l' kapo, la juda knabo neatendite kaj iom komike kliniĝis kaj ĵetiĝis per tuta sia pezo al la brusto de Palika. Tiel li evitis la frapon, Mile alkuris. Ekestis tumulto. Dum Palika rekoncentriĝis, la knabo profitis la momenton, forŝiriĝis de ili, suprenkuris tiujn kelkajn ŝtupojn kaj subite troviĝis vidalvide kun mi. Momente mi vidis lin antaŭ mi, kun altevitaj brakoj, unu lia manplato tute sanga kun dorsenklinita kapo kiel ĉe mortonto. Tiumomente mi unuafoje ekvidis lian vizaĝon. La buŝo duonapertita, la lipoj blankaj, la okuloj senrigardaj, disverŝiĝintaj kiel akvo, sen plu ia esprimo kaj delonge frenezumantaj. Tie oni devis frapi.

Kio okazis tiam? Kiomfoje mi starigis tiun demandon al mim mem kaj tiujn tagojn kaj la postajn jarojn. Kaj neniam mi povis trovi la respondon.

Kiel mi povis poste rememori kaj juĝi, la knabo iomete kliniĝis (estis tio la sama defendmovo kiel ĵus antaŭe kontraŭ Palika), puŝis min leĝere per tiu sendifektita mano en lumbon, forigis min kiel iun malpezan kurtenon, kaj per bruego trakuris la mallarĝan koridoron, preter mi senmova kaj preter mia altlevita leto sur kies fino videblis akra kaj granda najlo.

Mi rekoncentriĝis nur kiam preterkuris forpuŝinte min brute kaj malestime Mile kaj Palika. Staradis mi ankoraŭ sur la sama loko kaj aŭskultis kiel en sonĝo la eĥon de la koridora planko sub liaj piedoj. Poste mi malrapide eliris trenante mian leton kiel ŝarĝon. Ĉe la stratofindo mi vidis ke Mile kaj Palika kuras. La kuraĝiĝinta judido jam

malproksimiĝis. Ili kuris ankoraŭ iomete, kaj ekstaris, la unua, poste la alia. Interparolis iom certan tempon, kaj poste ekiris la saman vojon laŭ kiu ni estis venintaj, ne konsiderante min. Mi postiris ilin. Antaŭ ol ili alvenis ĝis la ponto, mi atingis ilin. Iris mi tiel malantaŭe ili, sed ili ŝajnis ne rimarki min. Tiu pozicio torturis min. Provis mi ion diri.

– Ne boju! – interrompis min Palika.

Kaj al ĉiu provo ke mi senkulpiĝu, ke mi diru ion ajn, li fride kaj kolere respondadis per lia: ne boju!

Pli ol tiu blasfemo zorgigis min la silento de Mile. Tiel ni trapasis la ponton kaj alproksimiĝis al nia kvartalo, marŝis mi du paŝojn malantaŭ ili, rekonante mi mem kiom stupinda kaj ridinda mi estas. Mi senĉese pripensadis kion oni devus diri kaj kiel senkulpiĝi. Eble mi dum tiu pripensado eĉ laŭte diris kelkajn vortojn. Tiam Mile subite haltis, turniĝis kaj antaŭ ol mi estis povinta ion diri aŭ fari por mia defendo, li kraĉis sur min, superŝutis min tutan per salivo. Se li estus frapinta min per sia gumtubo, estus mi verŝajne malpli konfuziĝinta kaj eble estus scianta kiel defendiĝi aŭ redoni al li la frapon. Tiamaniere mi staris meze de l' strato kaj viŝiĝis per maniko, dum ili malproksimiĝis, kiel ŝajnis al mi, nekredible rapide. Laŭ aspekto ili flugis, kaj la tempo staris.

Ethomoj, kiujn ni nomas "infanoj", havas siajn grandajn dolorojn kaj longajn suferojn, kiujn ili poste, kiel saĝaj kaj plenkreskaj homoj, forgesadas. Fakte perdas ilin el vido. Kaj se ni povus redescendi en nian infanecon, kiel en la elementlernejan benkon kiu ni antaŭlonge forlasis, denove ni ekvidis ilin. Tie malsupre, sub tiu angulo, tiuj doloroj kaj tiuj suferoj eĉ plue vivas kaj ekzistas kiel ĉiu realeco.

Hodiaŭ, post tiom da jaroj kaj okazintaĵoj, estas malfacile, estas neeble diri per mezuro de niaj nunaj spertoj kaj per esprimoj de niaj nunaj sentoj, kiaj estis tiaj unuaj sendormoj en la vivo, kiaj turmentoj kaj duboj pro la malestimo de gvidantoj Mile kaj Palika, pro la mokrido de la tuta infana roto el la kvartalo. Ĉiu provo ke mi pribeligu aŭ plibonigu la aferon, turniĝis je mia malutilo kaj puŝis min en ankoraŭ pli malbonajn humiligadojn kaj pli grandan izolitecon. Palika rakontis al ĉiuj mian hontaĵon kaj karikaturante min, montradis stratomeze kiom stulte mi preterlasis la judaĉidon, dum la infanoj ĉirkaŭ li ridegadis kaj faris ŝercojn por primoki min. Mile nur silentis kaj ne volis vidi min, nek aŭdi pri mi. Montradis min per fingro la infanoj de aliaj kvartaloj. Kaj mi mallevalidis la

rigardon antaŭ ĉiuj, kaŝiĝadis en la lernejo dum paŭzoj, en necesejo, kaj reiradis hejmen tra flankstratoj, kiel leprulo. Hejme mi povis diri nenion al neniŭ, nek demandi protekton aŭ konsolon. Ŝajnas ke mi jam tiutempe antaŭsentis tion kion mi poste klare komprenos, ke en niaj plej profundaj animsuferoj niaj gepatroj malmulte povas helpi, malmulte aŭ neniel.

Pasadis tiel la tagoj, kaj mi ne perdis, ŝajnas al mi eĉ unu momenton la konscion pri mia humiligado. Tuta mia infana mondo detruigis kaj, disrompita en pecoj, kuŝis ĉe miaj piedoj. Staris mi super ĝi malpotenca, komprenante nenion kaj konsciante nur de unu: mi suferis. Staris mi kaj ne sciis kien malaperi sub ĉi tiu ĉielo, tiel hontigita, submetita al mokrido, kaj sola. Kiel difini mian rilaton al Mile, Palika kaj aliaj kamaradoj kun kiuj mi per tuta mia animo dezirus esti egalrajta kunulo, sed ne sukcesas – kaj kiel al la judaj knaboj kiujn, ŝajnas, ke oni devas atakadi kaj batadi, sed mi tion ne povas kaj ne kapablas.

Finfine, ankaŭ tio iel transpaŝitis, kvankam mi neniam sukcesis trovi la respondon al tiuj demandoj. Mi iom post iom interpacigis kun la kamaradoj. Ŝajnis ke ili pardonis al mi. Aŭ nur forgesis? Nun mi plu ne rememoras. Sed ili neniam kunkondukis min al similaj bravaĵoj. Kaj mi ankoraŭ longe rememoris la tutan okazintaĵon kaj fojfoje songis ĝin. En songo mi preskaŭ ĉiam vidis la samon: la juda knabo kun martira vizaĝo preterkuras min, leĝera kaj nehaltigebla kiel anĝelo, kaj mi lin eĉ denove tralastas sen frapo, kvankam mi anticipe scias kio min pro tio atendas. Aŭ: mi staras stratomeze prikraĉita kaj sola, sub la senkompata posttagmeza lumo, dum la tempo staras senmova kaj la kunuloj abrupte malproksimiĝas. Nur pli malfrue la junulaj jaroj forviŝis tiun rememoron el mia konscio kaj forpuŝis tiun bildon el miaj songoj. Sed tio jam estis forgeso, morto de infanaĝo.“

*Tradukis Agnesa Eremia*



Simo Matavulj (1852-1908)

## **BAKONJA FRAT'-BRNE (Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

*(sesa parto)*

Post la meso la monakoj foriris en la manĝejon. Malsupre de la vespermanĝo de Jesuo Kristo jam estis vicigitaj ok seĝoj, kaj la monakoj vicsidiĝis laŭaĝe kaj laŭrange. Post kiam ili fortrinkis kafon, Ekskrementulo malfermis la pordon. La unua aliris la diakono Ĉimavica kaj kisis la manon de la monakejstro, dironte:

-Feliĉan Novan jaron al Vi! Donu Dio ke Vi ankoraŭ multajn jarojn ĝisvivu!

La monakejstro donis al li ian libreton kun ruĝaj kovriloj, kaj diris:

-Jen, fileto, tiu ĉi eta, sed grandvalora donacaĵo. Tio ĉi estas "Floro de la kristanaj virtoj" de nia klera frat'-Hieronimo Alatoviĉ. Legu tiun ĉi libron, fileto, tage kaj nokte, kaj kondu tu laŭ ĝi, cele de la savo de via animo. Amen!

La diakono kisis al li la manon, kaj same faris al ĉiu, ripetante la saman gratulon. Post li aliris la lernantetoj, Virkato, Bujas, Virvulpo kaj Korpulentulo. Ĉiu ricevis po floreneron de la monakejstro. Post ili Ekskrementulo, kiu ricevis dukaton. Post la kuiristo gratulis la muelisto Boban, la forĝisto Trtak, la ĉevalstalisto Stefano, poste la veturigistoj Beljan kaj Dundak, kaj fine la bovisto. Frat'-Funelo donis la novjardonacojn, al unu pli, al alia malpli grandan, depende de la oficjaroj. Fine Ekskrementulo distranĉis kelkajn pomojn kaj, ofertante ilin al la servistaro, verŝplenigis glaseton per brando, tostonte:

-Ja la nomo dia, kaj por bona komenco! Je la sano de nia respektata patro monakejstro kaj de ĉiuj monakoj, ĉeestantaj kaj forestantaj kaj de la tuta kristana popolo kaj de ĝia estro, sankta patro papo! Vivu ni!

Vivu ni! ekbruis pli junaj.

-Kio ja estas kun Lovriĉ? Ĉu iu forportis al li kafon? demandis la monakejstro la diakonon Ĉimavica meze de la tumulto.

Ĉimavica levis la ŝultrojn kaj eliris.

Dundak-on instigis la kamaradoj ke li tostu al ĉiu monako, kaj ke li je ĉiu tosto eltrinku brandglason. Li ridis kaj senĉese ekrigardadis frat'-Funelon (al kiu tiu alnomo, estu kromdirite, ne estis vane destinita). La

monako okulsignis kaj je tio Dundak tuj enverŝis en sin sep pokalojn da brando, kun tostado.

-Nun li eldiru preĝon! – diris Boban.

-Kian preĝon? – demandis frat'-Onklino.

-Nu, pastreto, iun kristanan preĝon! –Vi aŭdos ĝin!

La monakoj ekrigardis unuj la aliajn ridante, kaj per tio Dundak kuraĝiĝis kaj eksvingis la manojn. Ĉirkaŭ li fariĝis rondo, li krucsignis trifoje per tri fingroj "laŭkristane", kliniĝis trifoje frustrante ion, poste krucigis la manojn surbruste, levis la kapon kaj komencis kantetadi:

"Zelembaĉa kaprojn revenigas, laŭlonge, laŭlarĝe, por forpaŝti, por formelki, por kompili buteraĵon, por forŝmiri buŝon kaj ŝvelaĵojn. Ŝvelu vi nigra diablo, kiel grekoj sur bretaro. Ili estas bonaj ĉasantoj. Ili pafis arbare kaj kaptis la birdon fringelon. El ĝi ili eligas feĉon por ŝmiri virbovojn. Virbovoj muĝas, virbovoj bruas, virbovoj iras gajlovojon kaj trovas gajlan idon. La ido en ... opankojn trempis, perfingre pikadis, kaj per dentoj ĉirkaŭigadis... dio indulgu, amen!"

Denove li komencis kliniĝi kaj krucsigni.

Meze de tiu tumulto eniregis Ĉimavica, pala kiel ĉifono, kun la hirtiĝinta hararo.

Penpene li elparolis:

-Malbono! kaj englutis salivon kaj ekskuis la kapon, poste denove: Malbono!

-Malbono al Lovriĉ? – ekdemandis la monakejestro.

-Li for-pa-sis!

-Kion?

-Jes... li mortis!... mortis!...

Ĉiuj ekiris en la diakonan ĉelon, kiu situis inter tiuj de Trogulo kaj Onklino. Vere la kompatinda Kaŭrulo rigidiĝis, kun la okuloj melfermitaj. Sur la lito kaj planko du flaketoj da sango. Apud li, sur la tableto, kelkaj medikamentaj boteletoj. Liaj vestaĵoj disĵetitaj sur la kovrilo. Kontraŭ la lito, apudmure, estis la alia lito, sur kiu dormadis Ĉimavica.

Post kiam la monakejestro iom rekonsciiĝis, li superŝutis Ĉimavicajn per riproĉoj.

-Aĉulo, leprulo, fekaĵo, odoraĉa Ĉimavica, tiel vi atentis la kamaradon, he? Tiel vi zorgis pri li!...

Ĉiuj atakis la diakonon, kiom pli unu ol alia. Al frat'-Koleremulo eĉ tio ne sufiĉis, sed li manfrapis lin du-trifoje, kaj se li estis povinta el la interpuŝiĝo en la mallarĝa ĉambro, li ankaŭ perpiede tuŝus lin.

Frat'-Brne ŝveligas la vangojn kaj pretenas la ventron. Kiam ajn li vidis ion malagraban, la ventraĉo estis lin ekdoloranta.

Ĉiuj tumultas. Ekskrementulo malkovris la mortinton kaj frapetis lin per fingre sur la eniĝintan stomakon, dum la alian manon li svingadas kaj ion parolas. Dundak malfermis medikamentajn boteletojn kaj ĉiun flaradis. Boban levis la sekan piedon de la mortinto kaj mezuras per fingre ĝian dikecon. Nur Stefano kunigis la manojn surbruste kaj rigardas.

-Kial ja mi kulpas? Kial mi kulpas, je la vundoj de Jesuo Kristo? vekriis Ĉimavica kiam apenaŭ iĝis lia vico por ke ili aŭdu lin. Kion mi povis fari? Jen hieraŭvespere kaptis lin temperaturo kaj li tusadis kaj ŝvitis, same kiel ĉiuvespere! Kaj tion vi ĉiuj sciis. Ĝuste hieraŭ vespere li fartis pli bone kaj ni interparolis kaj ridis. Li ankoraŭ diris ke li venos ĉi-matene al la matenpreĝo, se la vento malfortiĝos. "Sed ne veku min, se mi mem ne vekiĝos", - diris li al mi. Kaj ĉi-matene, post la unuaj sonorilsonoj, mi mallaŭte dufoje alvokis: "Inocenco! Inocenco! Kaj kiam mi vidis ke li estis dormanta (ĉar mi pensis ke li estis dormanta), mi forlasis lin, ĉar kion alian mi estus farinta?..."

-Ti-e! Do, li forpasis jam ĉi-nokte?

-Kompreneble! Tio estas tuj videbla! diris Onklino.

-Ho Dio! Dio! ja tiel ĉi? Sen konfeso kaj sen komuniigo!

-Kion fari, do? Kio okazis, jen estas!

-Nun ne helpas konfuzo, sed ni ordigu kio estas ordigenda! diris frat'-Onklino.

-Sed, pri kio mi kulpas? Kion mi povis fari, por la bona Virgulino? pluveas Ĉimavica.

-Ho fraĉjo, kiu kulpigas vin? Kiu diras ke vi kulpas pri io? konsolas lin frat'-Brne.

Nun ĉiuj komencis konsoli la diakonon.

-Kial, do, li batas min? demandas la diakono.

-Kial! Kial! diris la monakejestro. Jen tial! Oni ekbezonas elverŝi koleron, kaj vi estas pli juna, kaj... iru ni! Iru ni por finordigi kio estas enda!

Stefano, kiu jam delonge estis malpardonema al frat'-Koleremulo, elirante, minacrigardis lin, kaj diris akre:

-Estas facile elverŝi koleron je la malforta kaj pli juna, nur ne estas juste, sed je mia kruco...

-Kion ja, je via kruco? ekardis la furioza Koleremulo, - kio okazus se mi vin, he? Nu?...

Oni tuj disigis ilin.

-Ho, ho, ho! komencis mallaŭte frat'-Betulo. Vi, Stefano, kvazaŭ perdus respekton al la monakoj, ho! ho!

Je mia fido, monaĉjo, mi malmulte estimas, kiam iu volas batpremi, eĉ se li estus episkopo, ĉu vi komprenas? Kaj tiu knabeto ne estas kulpa, sekve min doloras kiam mi vidas maljustaĵon.

Frat'-Koleremulo eksvingis je li, sed feliĉe oni lin retenis, ĉar vere li estis subiĝonta al malbono.

La monakejestro tuj elpagis la dungsalajron al Stefano kaj forigis lin. Frat'-Brne, blovante senĉese kaj premtenante la ventraĉon, donacis al li kvin kronmonerojn pro tio ke li bone gardadis la flavĉevalon. Kaj tiel la bravulo Stefano elmonakejiĝis.

Poste oni sendis la serviston kun la letero en la urbon, al la majstro Bortulo Lovriĉ, ŝuisto kaj informis lin ke lia filo Inocenco subite forpasis.

Poste oni vestis la mortinton kaj transportis lin en la preĝejon, kie, laŭvice, oni komencis legadi ritpreĝojn.

Korpulentulo verŝis kvaroblajn larmojn kaj ne moviĝadis de ĉe la mortinto. Li unika en la monakejo estis afliktita.

En la monaka manĝejo, dum la tagmanĝo, komenciĝis akra teologia disputo.

Frat'-Onklino asertadis ke dum grandaj festotagoj oni ne povas, sen malbono, doni absolvon al mortinta monako. Frat'-Balgo asertadis kontraŭe. Funelo kaj Trogulo samopiniis kun Balgo, kaj la aliaj konsentis kun Onklino. Ĉiu klopodis ekrememori iajn vortojn el la sanktaj libroj, per kiuj oni povus konfirmi sian opinion. Vostvolvulo vetis kun Trogulo ke li ion trovos en iu libro, pro kio li vizitadis la monakejan bibliotekon, kaj perdis la veton. Fine, ĉiu retenis sian opinion.

La morgaŭan tagon venis la majstro Lovriĉ.

Li estis malgrandega, sed muskola kaj lerta, kun longaj nigraj lipharoj kaj ruĝa nazo. Li estis proksimume kvindekjara. Li ne montris grandan ĉagrenon. Plej bone konsolis lin Dundak, kun kiu li eldrinkis pli ol litron da pikanta brando.

-Vidu! – diris Dundak al li. Li estis molaĵo, fraĉjo. Vi scias kion mi en Kotari nomas molaĵo? Tio estas, vi scias, ovo kovita sen ŝelo. Li estis tia ovo kaj krevis pro frosto...

Diableee! ekkriis la majstro. Kiun li similas, diable!? Mi dudek jarojn vagadis tra Italio, Ĉeĥio, estis tri jarojn en Vieno, kvara jarojn en Moravio, Stirio, Slovenio, Salcburgo, Ŝpilbergo, Trento, Tristo, Verono, Mantovo, Piaĉenco, poste en Hungario, la tutan Hungarion mi trapasis kiel ĉi-manplaton, ĉu vi komprenas? Mi estis en diabla domo! Mi estis en Papa lando kaj batalis kontraŭ francoj. Mi longe staradis ekstere, dumnokte, pluv-malsekiĝadis, piediradis po dek horojn tage, kaj neniam eĉ malvarmumetis. Sed li... kiel vi diras... molaĵo, venis al mondo kvazaŭ

senspira! Ĝuste tial mi restigis lin ĉi tie inter (li aldonis flustre) sataj senlaboruloj, kaj, jen tute same, diablee!...

-Sed povas esti ke ĝuste liaj dentoj agaciĝis pro tio ke vi manĝis nematurajn fruktojn? diris Dundak, al kiu, same kiel al ĉiuj monakejanoj, restis en la menso iu eldiro de Biblio.

La majstron Lovriĉ, en lia junaĝo, la komunumo perforte forigis "al soldataro", ĉar la tuta urbo ne havis trankvilon pro lia kondutaĉo. Reveninte hejmen post dekkvin jaroj, li edziĝis kun iu malsaneta, kaj jam matura fraŭlino, kiu posedis ioman posedaĵon. En la armeo li ellernis ŝuistan metion, kaj bonstatis en la urbo. Li faradis ŝuojn al la monakoj, pro kio ĝuste ili akceptis lian filon. Tio estis la unika lernanto, al kiu neniu monako estis parenco. La edzino de Lovriĉ mortis post kvar jaroj, kaj jen ni vidis kiel la filo finis kun dudek unu jaroj de sia kompatinda vivo.

Oni enterigis la malfeliĉan diakonon, kaj, iom post iom, komencis revenadi la malnova ordo en la monakejo, sed, samtempe, eksentiĝis "fantom-timo".

Ĉimavica, post kiam li kvar tagojn dormis same kie antaŭe, subite instigis ke oni lin transloku. Li ne volis diri kion li ektimegis, sed kiam iu demandas lin pri tio, li ekkoleras, dum sur lia vizaĝo legeblis teruraj rakontoj. Tiomo estis sufiĉa por ke la timo kaptu la lernantojn. Kaj kiam Ĉimavica postulis kaj ricevis la permeson por foriri hejmen por kelka tempo, tiam la timo eniĝis en ĉiujn servistojn, kaj kaptis eĉ frat'-Brne-n. La malfeliĉa Ĉimavica ne haltis eĉ je tio, sed skribis el sia hejmo al la onklo Frat'-Pinjata Noktuo, kiu tiutempe posedis la parokon en O. En la letero li petis ke la onklo translokigu lin en iun alian monakejon, ĉar li pli volonte "forigus monakveston" ol revenus en V., ĉar la domo estas ombra ("multe ombra"). Frat'-Pinjata plenumis la postulon de la nevo, kaj lian leteron sendis al frat'-Funelo, aldoninte li mem: ke estus bone ke la fratoj legu la ritpreĝon por la eterna paco de Kaŭrul-animo. Nun la timo kaptis ankaŭ la monakojn, escepte de Onklino kaj Koleremulo. Vane ĉi-duopo kontraŭis ke la ritpreĝo estu legata, ĉar apenaŭ post tio ardiĝos la fantazio de junuloj. Frat'-Brne asertadis ke ĝi legendas, kaj kun li konsentis ankoraŭ kvar fratoj. Komenciĝis intensega teologia disputo, kaj oni helpvokantis la sanktajn patrojn. Sed, kiel kutime estas en tiaj okazoj, la superitoj jam ekfuriozis kaj retenis siajn poziciojn. La bravega frat'-Koleremulo ne scipovis disputi, sed kriis:

-Tiu leprulo, tiu haladza Ĉimavica elpensis ion nur por trovi pretekston por ekvagadi, kaj vi tuj: tap! top! ĝuste tuj al sanktaj patroj kaj altarlibroj! Jen bone li faris por malaperi de ĉi tie, ĉar se li denove revenus, mi piedtuŝus lin kie li estas la plej ĉasta! Noktuo de noktuo, kiaj

estas ĉiuj liaj, kaj pleje Pinjataĉo!... Kaj la mortinta Kaŭrulo prezentiĝu al mi mem, se li kuraĝas.

Korpulentulo sorbis la vortojn de Koleremulo. Korpulentulon ravis ĉio vireca kaj braveca kaj kvankam mirante la klerecon de la aliaj monakoj, li ankoraŭ pli multe miris la kuraĝon de Koleremulo. Ne timi la mortintan Kaŭrulon, sed eĉ defii lin.

La alian vesperon post alveno de Pinjata-letero, sidiĝis la monakoj por vespermanĝi. Bujas ĉe la pupitro komencis legi pri la vivo de la sanktulo kies estas la tago.

-Juna Jerkoviĉ! alvokis Koleremulo interrompinte la leganton.

-Kion vi diris? reagis Korpulentulo enirinte al ili.

-Alportu al mi viŝtukon el la ĉambro, jen la ŝlosilo!

Korpulentulo turnis sin, okulsigninte al Virkato.

-Kaj kien vi? demandis Koleremulo Virkaton.

-Mi... jen...

-Vi, jen, restu kie vi estas, kaj vi, Jerkoviĉ, alportu kion mi ordonis.

La leganto daŭrigis:

-La benito, auskultinte tion de la anĝelo, vizaĝfalis surteren, kaj kliniĝis kaj parolis...

Dum tio Korpulentulo revenis, pala kiel ĉifono, kaj transdonis la viŝtukon. Ĉiuj monakoj ekrigardis lin. Korpulentulo – en la porlernanta manĝejo – ĵetsidiĝis sur la benkon kaj komencis viŝi sviton de sur la frunto.

-Vi vidis lin, ĉu ne? demandis Virkato kaj Virvulpo.

Korpulentulo ekskuis la kapon kaj pene elparolis:

-Ne, sed ŝajnis al mi ke li estis malantaŭ mia dorso...

Ŝkopiĉ! ekkriis frat'-Onklino.

-Kion vi diris? reagis Virkato.

-Iru kaj alportu al mi tiun skatolon kun pulvoro el mia ĉambro! Mi forgesis ĝin, kaj devas gluttrinki ĝin kun vino.

Virkato devis ĉiukaze iri. Li vidis malbonan monakan ludon, sed estis ende obei. Kiam estinte kontraŭ la lerneja ĉambro, li ekkriegis kaj revenis.

-Kio estas? oni demandis lin.

-Ve al mi! Mi vidis lin...

-Kiun? demandis Koleremulo, kaj saltis kaj ekstaris kontraŭ li.

-Mi ne scias,... frat',... eble ekŝajnis al mi...

Koleremulo eliris insultante. Post lin ekiregis Onklino.

Poste Virkato surgenuiĝis vid-al-vide al Jesuo Kristo.

-Je tiu ĉi krucumo, ekleziuloj, li mem estis... Li, Kaŭrulo mem.

-Ŝajnis al vi, stultulo.

Ne ŝajnis, mi ja ĵuras al vi!...

La monakejestro kaj ĉiuj aliaj ne plu volis aŭskulti, sed foriris.

-Li, li – dirdaŭrigis Virkato al la lernantoj. Li apogis sin al la muro, kaj faris grandajn okulojn je mi! Ve al mi! Ve al mi! Kiel ja mi ne mortis surloke!...

-He, nun oni jam ne havas pro kio kaŝi! komencis Ekskrementulo. Ĝis nun mi kaŝis pro la doma paco, sed nun oni jam ne havas pro kio kaŝi! Ankaŭ mi mem vidis lin!

Estas imageble, kiel tio konsternis la lernantojn.

-Mi vidis... kio estas, estas, kaj vi scias ke mi ne mensogas! Ahtaŭhieraaŭ, antaŭvespere de dimanĉo, kiam vi ĉiuj ĉeestis la grandan benmeson, dum la krepuskiĝo, mi apogis min al tiu ĉi fenestro, kaj observadis kia estos la vetero. Mi observadis, observadis, ĝis miaj okuloj rigarde direktiĝis al la tombejo, kaj tie li elstarigis la kapon supren de la muro, kaj faris ege grandajn okulojn je mi! Miaj piedoj, fraĉjo mia, kurbiĝis kiel du fadenoj. Mi volas elpeti "saluton de Dipatrino", sed ne povas! Kiamaniere li povis atingi per la kapo tian altecon? Li verŝajne supreniris la tombon de la mortinta frat'-Feliciano Felicianoviĉo...

Ekskrementulo ankoraŭ diris al ili ke Kaŭrulo anoncadis sin al Boban, Beljan, Trtak kaj al la bovisto, sed ke oni kaŝadis tion pro la paco hejma, kaj nun jam estas nekaŝebla!

Kompreneble, la saman vesperon eksciis ankaŭ la monakoj, ĉiu de sia lernanto. La morgaŭan tagon, post la benmeso, kunvenis ĉiuj en la ĉambron de la mortinto, kie oni legis grandan ritpreĝon.

Sed, grandmire de ĉiu, eĉ la ritpreĝo ne helpis. Kaŭrulo komencis reaperadi ankoraŭ pli ofte. Fine, li mem klarigis al Dundak kial li ne havas pacon.

Dundakon renkontis Kaŭrulo tutmeze de la tago, kiam li iris de ĉe la akvoveturilejo al la monakejo. Dundak, netima, kaj lerta en tio kiel oni devas konduti en tiaj okazoj, krucsignis, eldiris mallaŭte "saluton al Virgulino", kaj demandis la fantomon: "Animo kristana! Kion vi volas de mi?" –"Mi volas konfesi al vi!" –"Animo kristana, iru por tio al iu monako!" –"Ne, sed ĝuste al tiu, kiun mi la unuan renkontas! Tiel estas ordonite al mi, por puno ke mi mankis fari tion antaŭ ol esti mortinta. Do... aŭskultu..." Dundak devis aŭskulti la tutan konfeson ĝisfine, ĉiujn grandajn kaj etajn pekojn de Kaŭrulo, eĉ tion kiel li ŝteladis tabakon de frat'-Balgo, kaj sendadis ĝin al patro, enurben. Poste la fantomo diris ke oni vane kantis la ritpreĝon, ĉar ke li havos nek pacon nek ripozon en la

tombo, dum li (Kaŭrulo) ne forkantos la meson en la monakeja preĝejo. Kaj tio okazos dumnokte. Kaj tio okazos post kiam forfluos la tempo kiu estus pasinta, eĉ se li estus viva, ĝis "la nova meso!"

Tuj post kiam tio disaŭdiĝis, frat'-Brne ne lasadis al Korpulentulo iri de ĉe li, kaj komencis kun li interparoladi pri io ajn, kaj fine komencis ekzamenadi lin pri tio kion li ellernis kiel lernanto. Korpulentulo elmontris la tutan sian scion antaŭ la onklo, dum malpli ol duonhoro. Poste la frato paroltuŝis animon, kaj komencis diradi al li pli gravajn aferojn.

Koleremulo koleris je "la elpenso de infanaĉoj", kaj plejparte je frat'-Brne, kiu ĝuste "infaniĝis". Sed kiam lia kolero devis kulmini, ĝuste tiam ĝi mildiĝis kaj li neniun riproĉadis.

-Ĝuste ne estas malbone ke tiuj ĉi stultaĵoj disaŭdiĝu, diris li al frat'-Onklino solsole. Niaj homoj timas pli multe unu mortinton ol centon da vivantoj. Kaj pli bonas por ni, se tiuj transriveruloj ektimigos, precipe ĉi-jare, kiam malmultas la rikolto!

Vere, transrivere diskoniĝis ke la diakono vampiriĝis, kaj neniu kuraĝis nokte ŝtelveni, eĉ se sciante ke li trezoron "kaptos".

## **KION ONI FARIS EN LA TEMPO DE KRUĈEGULO**

Forfluis du jaroj sen iaj gravaj okazaĵoj en la monakejo, kaj denove ekestis la tempo plena je malbonoj.

Je la tago de la s-a. Frane Saleski (la dudekunuan de januaro laŭ la roma kalendaro) dumaŭrore disfalis iom da neĝo sur la insulon. Ĝi ne estis eĉ tioma por povi plandon kovri, sed eĉ tio estis neordinara en tiu paroka loko, kiu estas ĉiam senneĝa kaj en kiu magdalarboj floras je Kandelfesto. La tago de la vintra s-a. Frane ne estas ordona festo al la popolo, sed jes al la monakoj, kaj ili kantis grandan meson, kaj dumtage ankaŭ la lernantoj estis ricevontaj manĝaĵon pli. Apenaŭ la monakoj kaj kaj lernantoj eliris el la preĝejo, kiam tra la granda pordo eniris la korton alta vilaĝano en Bukovica-kostumo. Stranga diablo! Lia kapo estis ronda, okuloj grandaj kaj grizetaj kiel la noktujaj, lia dekstra lipharo pli longa ol la maldekstra, sur la malkovrita brusto tuta densaĵo da krispaj haroj. Li havis je si veŝton kun ankoraŭ kelkaj butonoj, nerekoneble de kiu koloro. Lia leda zono estis tute kovrita per metalaj najletoj, kaj en ĝin enigitaj pistolo kaj vergeto. Lia pantalono falis malsupren de la ventro, tiel ke la ventro estis kovrita nur per la ĉemizo, kaj tra la aerlasaĵoj videblis ŝlima karno. Sur la genuoj ŝvelis la pantalono, kaj sub la genuoj li ĉirkaŭpremis ledajn ŝtrumpligilojn. Je la piedoj, supre de la ŝiritaj surŝtrumpoj estis krucligitaj



opankaĉoj! Ĉar ne estis tiom malvarme, li ne vestis Bukovica-"surajon", sed dismetis ĝin al si, kaj unu manon tenis post la armilo.

-Kia estas tiu mallertulo, pro Dio!? diris Koleremulo. De kie vi estas?

-Mi? Ĉu ne? diris kvazaŭ el kuvo Bukovica-ano, rigardante stulte. Ĉiuj ekridegis.

Bukovica-ano purigis la nazon per du fingroj, kaj redemandis:

-Mi? Ĉu mi?

-Vi mem, de kie vi estas? Kial vi venis ĉi tien?

Ĉu ja vi estas monakoj?

-Jes, ni estas.

Bukovica-ano rapide deprenis la ĉapon, kaj aliris kisi iliajn manojn, parolante:

-Mi, jen, aŭdis ke vi bezonas ĉevalstalion, kaj, jen, miadire, mi iru en la monakejon kaj diru: mi povus...

-Kaj de kie vi estas?

-Mi? Ĉu ne? El Bukovica, el Zelengrad...

-Ĉu vi ja estas kristano?

-Mi? Ĉu ne? Mi ne estas, ne donu Dio, sed mi estas el Zelengrad, kaj en Zelengrad ne ekzistas kristanoj, same ili ne ekzistas en Medvedja, ili ne ekzistas en tiuj du vilaĝoj, kaj ĉiuj aliaj, vi scias, ĉiuj en Bukovica estas kristanoj...

-Kaj ĉu vi scipovus strigli ĉevalojn? demandis Trogulo.

-Mi? Ĉu ne? Jes, ĝuste! Mi...

-Kaj kiel oni nomas vin? demandis la monakejestro.

-Min, ĉu ne? Oni nomas min Grgo...

-Ĉegoviĉ?

-Prokasa! Grgo Prokasa, vi scias, el Zelengrad...

-Nur mankas al ni ankoraŭ dungi tiajn ĉi bestojn! diris itallingve frat'-Balgo.

-Kaj kial ne? diris Koleremulo. Ĉu ĝenas nin ke li estas stultulo! Ĝuste tiaj ĉi estas bonaj por la ofico.

Kaj Trogulo kaj la monakejestro opiniis same kiel Koleremulo. Dum ili "italklaĉis", Bukovica-ano rigardis tiel stulte ke la lernantoj ridegis.

-Kaj ĉu mi povus, mi diru, pardonu, eniri la preĝejon por, mi diru, preĝi al Dio? demandis Grgo.

-Atendu, poste vi faros! respondis la monakejestro kaj ekparolis itallingve:

-Vidu, tio ĉi plaĉas al mi! Lia unua penso estas preĝejo! Kio diras: ordinara, nefia vilaĝano, de kiaj perdiĝas spuroj!

Poste li redemandis lin:

-Do, vi scipovus strigli ĉevalojn?...Jes, vi diras. Kaj kioman jarpagon vi postulus?

-Mi? Ĉu ne? Al mi, patro, donu opankojn, kaj ĉemizon donu al mi, kaj nutradon donu al mi, kaj monon, mi diru, kiom vi vidas, kiom mi formeritos. Sed, mi pertas vin, lasu min eniri la preĝejon.

-Nu iru preĝi al Dio kiel vera kristano, kaj ni provos vin dum kelkaj tagoj. Nu, iru, iru!

La monakoj foriris al kafo kaj la lernantoj foriris Grgo-n en la preĝejon.

Tuj post transiro de la sojlo li malfermis la buŝon, poste etendis sin per tutaj longeco kaj larĝeco kaj kisis la plataĵon. La lernantoj laŭte ridis. Grgo demandis ilin kies estas s-a. Frane. Ili kondukis lin al la ĉefa altaro, kie Grgo kliniĝadis kaj batadis la bruston, kiom pli multe li povis.

Post kelkaj tagoj Bukovica-ano plezurigis la monakojn. Kvankam tre stulta, li tamen sufiĉe lerte laboris rilate al ĉevaloj.

Oni eknomis lin *Kruĉegulo* pro lia granda kapo, kaj eĉ antaŭ li oni tiel nomis, sed li neniom koleris. Al la lernantoj kaj servistoj li servis por mokŝercado. Kiam ajn povante, ili arighadis ĉirkaŭ lin, kaj ŝercadis. Kaj plej ridinde estis kiam oni diris al li ke Kaŭrulo vampiriĝis. Ridante pro lia troa timo, ĉiu liberiĝis iom de sia timo.

Post kiam li finadis la taglaboron en la ĉevalejo, tuj kaptadis Kruĉegulon aŭ Boban, aŭ Trtak, simple, kiu la unua atingadis lin.

Ĉu ke li fnkciigu balgojn en la forĝejo, ĉu ke li batadu per granda martelego aŭ deŝarĝu kaj surdorse portu sakojn da karbo kiuj perveturile alvenadis; reŝutadu korbegojn de la muelejo; kolektadu farunon; akvovadu, se io kroĉiĝis inter la turbinkuleroj, se la kluzon akvo forportis aŭ la kanalo plenŝtopiĝis. Kiam ĉeestadis mueligantoj kaj hufoferistoj de transrivere, Kruĉegulo estis po iom helpata; la homoj donadis, iu pipon da tabako, iu ioman grasaĵon, aŭ po iun moneron – kvankam ili plenplene mokadis la stultan Bukovica-anon.

---

(daŭrigota)

## **AL LA JUDA FORIRINTO**

Li fermis la kofron, manpremis – adiaŭ!  
Sen la protesto li iris ... Hodiaŭ  
mi tion komprenas; li povis nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kun kapo klinita la kofron li portis.  
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis  
sen la protesto ... Li povis nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kaj iam la filo kun filo parolos,  
kaj tiu demandos, la veron li volos.  
La mia silentos ... kaj povos nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,  
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.  
Sed Auschwitz ekzistis! Nu, kion plu diri?  
Ke mi kaj ke vi --- ni lin lasis foriri.

Lodevijk Kornelis Deij

## **JEVREJSKOM ODLAZNIKU**

(Al la juda foririnto)

Uzeo je kofer, mahnuo mi - zdravo!  
U čeljust smrti je pošao... Zapravo  
danas shvatam. Morao je da se čudi:  
Ja, hrišćanin, u smrt ga pustio, ljudi!

Pognute glave, zna, ide u bezumlje,  
u dušegupku, u Aušvic - da umre!  
Ćutao je... Morao je da se čudi:  
Ja, hrišćanin, u smrt ga pustio, ljudi!

Sinovi naši jedanput će se sresti.  
Zajedno će se put istine odvesti.  
Šta moj da kaže? Zar samo da se čudi:  
Ja, hrišćanin, u smrt ga pustio, ljudi!

Žalili smo ga, ali ginuli nismo.  
Decu mu skrivali, slali poneko pismo.  
Ipak, Aušvic! Savest čoveku sudi:  
Ti i ja...Mi, u smrt ga pustismo, ljudi!

Sa esperanta prepevao  
Zlatoje Martinov

Zlatoje Martinov, Esperanto-Instituto, Beogrado

## **Interligo de naciaj literaturoj kaj Esperanto kiel literatura medio**

La literaturo en Esperanto ekde la komencoj tre klare kaj sendube anoncis la procezon de aŭtentika literatura riĉeco surbaze de propraj esprimaj rimedoj, sed ankaŭ surbaze de la utiligo de naciaj literaturoj pere de la traduka aktivado.

La fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcento estis ĝenerale periodo de forta interpenetrado de naciaj kulturoj, akceptado de fremdaj influoj, sed ankaŭ periodo de diskutoj pri loko, rolo kaj tasko de Esperanto-literaturo en la monda beletro. Same, la drameca politika historio de la epoko grandparte influis la literaturan kreadon en Esperanto. Kiam konatas la fakto ke la internacia lingvo estis praktike ideala spaco de interkruciĝo de la plej diversaj kulturinfluoj, ke ĝi estis kaj restis akceptebla por la heredaĵo kiun al la mondo dum jarcentoj donacis naciaj literaturoj, tiam estas tute klare ke danke al sia larĝa bazo, kiu konsistigas esperantistojn el multaj landoj kaj kulturoj, ĝi havas unikecan eblon tuj, senprokraste, preni de la plej diversaj naciaj literaturoj la estetikajn, formajn, stilajn, kaj aliajn utilajn novaĵojn. La fakto, ke la pozitivaj influoj de la monda beletro grandparte determinas la disvolviĝkurson de Esperanto-literaturo, kuraĝigantas ne nur pro la fakto ke nia literaturo siaflanke certigos pluan normalan kaj senĝenan lingvoevoluan, sed ankaŭ pro si mem; nome, tio helpus al ĝi fariĝi vere universala, kaj samtempe libere uzi proprajn, aŭtentikajn, kaj dum pli ol jarcento konstruitajn, rimedojn. La Esperanta literaturo jam hodiaŭ iĝis bonkvalita kaj matura, estetike pli proksima al la naciaj, vera egalrajta parto de la mondliteraturo.

Alia ĝia specifo kaj avantaĝo de la internacia lingvo kompare kun la naciaj lingvoj kaj literaturoj speguliĝas sur la tradukplano. La traduka Esperanto-literaturo, nome, havas pli larĝan dispersan reton koncerne la

tiel nomatajn "malgrandajn" literaturojn ol la naciaj tradukliteraturoj. La naciaj tradukliteraturoj, pro komercaj kialoj, sed ankaŭ pro la ofta ĝenerala ignoraspekto de la "malproksimaj kaj nekonataj kulturoj", plejparte fokusiĝas je literaturoj de la plej grandaj nacioj (angla, usona, franca, germana, itala, rusa) tute neglektante aliajn naciajn literaturajn atingiĝojn. En Esperanta traduko oni tre ofte povas trovi la vjetnamajn, litovajn, serbajn, bulgarajn, kroatajn, islandajn, ktp., verkistojn. Mi en la serba lingvo neniam vidis ajnan verkon de iu vjetnama aŭ litova verkisto. Dum lastaj jardekoj oni serben tradukis literaturaĵojn plejparte el la angla lingvo kaj ties literatur-regiono. Same estas, mi kredas, en aliaj naciaj tradukliteraturoj.

Sed la Esperanta leganto tute normale akceptas la fakton legi ekz. islandan aŭtoron en esperanto danke al la traduko de literatura talenta islanda esperantisto. Oni same ĝuas legante la originalajn Esperanto-poemojn de Baldur Ragnarson, la plej elstara Esperanto-poeto de la nuntempo, samkiel legante liajn brilajn esperantajn tradukojn de la islandaj aŭtoroj.

Sed ne malofte okazas ke ĝuste tiajn ĉi verkojn, jam en Esperanton tradukitajn de unu nacia lingvo, oni retradukas al la alia. Tion oni faras, trovante ilin interesaj, literature bonkvalitaj kaj ĝueblaj. Sed oni neniel povas legante ĝui, se la traduko estas malbona, neadekvata, neĝusta, ne sufiĉe arta. Por tion ekspliki, ni bezonas kelkajn kurtajn klarigojn kaj rimarkojn pri la ĝeneralaj postuloj de bona traduko.

La tradukprocezo ne egalas al tiel nomata memstara kreado. Memstara kreinto, ĉu poeto, ĉu prozisto, mem anoncas siajn animproduktojn, informas senpere pri ili.

Tradukinto ne faras tiel! Li dependas de la poeto, verkisto, eseisto k.s. La tradukinto estas ilia advokato, ilia peranto, ilia rajtigito. De lia kapablo plejparte dependas ilia sukceso, sukceso de iliaj verkoj, ĉar oni prave diras: malbona traduko nemalofte sukcesas "mortigi" bonkvalitan verkiston.

La nombro de talentaj verkistoj estas pli granda ol tiu de tradukintoj. Se la laboro de la tradukintoj estus facila, la tradukintoj certe abundus! Do, se temas pri speciala talento esti sukcesplena tradukinto - kaj ĝi estas nepre bezonata - tiam klaras ke ĉi-talento estas tiu de aparta speco, ke ĝi konsistas el multnombraj elementoj, eĉ pli multnombraj ol tiuj de t.n. memstaraj kreintoj, kaj ĝi estas, do, pli malofta, se ne eĉ tro malofta. Tiu ĉi aserto estas tiom veroplena ke oni eĉ ne devas ĝin pruvi. Multaj verkistoj estas ankaŭ tradukistoj aŭ tradukintoj, kiel ajn oni volas.

La konkludo evidente favoras la tradukinton kiel eksterordinaran specon de kreinto.

Sed kiamaniere atingi la tiel nomatan “proksimecon”, aŭtentikecon de la traduka teksto?

La unua kondiĉo estas ke la tradukinto devas havi literaturan talenton, poetikan senton, devas esti iuspeca literaturisto, kvankam nenepre ke li estu verkisto aŭ poeto. Li simple devas havi kreativajn kapablojn, grandajn ĉiosciojn, inventemon, erudicion kaj bonan konon de diversaj sciencoj kaj fakoj. Lia personeco, do, devas esti kompleta, pli kompleta ol tiu de la verkisto.

La dua nepra kondiĉo estas bonega kono de Esperanto al/de kiu li tradukas de/al la gepatra lingvo. Kiom multe la esperantistoj tiun kondiĉon bagateligas! Nur en kontakto kun la beletra teksto Esperanto-tradukinto sentas la kompletan kaj veran gravecon de ĉi tiu kondiĉo! Tiam li ekkonas kiom malgranda estas lia kono de la internacia lingvo, “facila kaj simpla”! Kiom multe da pacienco li devas havi! Kiu ne havas la bonegan lingvokonon kaj la paciencan - ne komencu tradukadi!

La tria kondiĉo estas la samnivela kono de la gepatra lingvo. Multaj antaŭjuĝoj regas koncerne bonegan konon de la gepatra lingvo de la tradukinto. Naskiĝinte en konkreta regiono, parolante ĉiutage la gepatran lingvon, lernante kaj studante, eventuala tradukonto konsideras sin bona konanto de la lingvo.

Bedaŭrinde tio neniam estas vero. Ankaŭ la gepatran lingvon oni devas konstante lerni. Kiel ĉiu lingvo, ankaŭ la gepatra, ŝanĝiĝas, evoluas, perfektigigas, riĉiĝas per novaj vortoj... La tradukonto devus sekvi la lingvo-ŝanĝojn, nuancajn evoluojn, unuvorte li devas, se volante iĝi kvalita tradukanto, sekvi sian propran lingvon kiel infano, paŝon post paŝo. La pleja principo en la tradukarto estas ke nekonata legontaro, ĉu la esperanta, ĉu la gepatra, sentu ke en la manoj tenas originalan libron, ne la tradukaĵon.

Se oni sukcesis kontentigi tiun plejan kondiĉon, tiam oni povas diri ke tutcerte la tradukprocezo estas siaspeca artprocezo, la tradukinto estas vera artisto kaj la tradukaĵo estas arto ĝuste pro la fakto ke oni ĝin preskaŭ ne povas diferencigi de la originalo.

Nur tiam talentaj esperantistoj-tradukintoj ekdezirus retraduki de Esperanto al siaj gepatraj lingvoj iun nacian verkon (poemon, romanon, rakonton, eseon). Iuj povas riproĉi la fakton ke ankaŭ nacia lingvo, ekzemple la angla, povas esti tutsama ligilo, iu speco de ponto inter diversaj literaturoj kaj kulturoj. Ili nur parte pravas, sed tamen la ĉefa kaj

evidenta avantaĝo de Esperanto konsistigas pli adekvatan kaj pli egalmezuran traduk-disperson de la naciaj lingvoj. Ekzemple en la serba traduka literaturo dum jardekoj oni povis renkontiĝi kun peraj, anglaj tradukoj de la japana kaj ĉina literaturo, kvankam temis pri du antikvaj kaj grandaj kulturoj, ĉar en Serbio tiutempe ne ekzistis katedroj pri la japana kaj la ĉina lingvoj en la Universitato; simple, mankis la tradukspertuloj por la japana kaj ĉina lingvoj. Traduki serben la t.n. "forajn kulturojn" el la angla lingvo estis nura ebleco por ekkoni la serban leganton kun atingiĝoj de tiuj du landoj kun granda historio kaj longa kultura tradicio.

Sed mi neniam vidis ajnan serban tradukon de vjetnama, litova, islanda ktp. literaturo pere de la angla lingvo! Sed pere de Esperanto tiaj tradukoj ekzistas! Aparta afero kompreneble estas paroli pri la valoro de la retraduko t.e. "traduko de traduko", sed se kvalifikitaj kaj spertaj tradukintoj atentigas pri supre menciitaj tradukpostuloj, danke al lingvaj eblecoj de Esperanto, la retraduko tamen povas kontentigi la leganton sen granda deformiĝo de la originala verko.

Esperanto kiel vera lingvo-ponto, laŭ sia esenca karaktero ligi, sed ne dividi la popolojn kaj iliajn kulturojn, ne rajtas ignori la literaturan kreadon de iu ajn nacio monda. Kontraŭe, ofte neglektante la komercajn utiligojn, Esperanto-eldonejoj kaj unuopaj entuziasmoj publikigas tradukojn de la malgrandaj popoloj kaj iliaj literaturoj, kiuj alimaniere neniam povus esti legataj ne nur en Usono, Britio, Germanio, Italio kaj aliaj ekonomie kaj kulture disvolviĝintaj landoj, sed ankaŭ en same malgrandaj kaj "sensignifaj" landoj kaj kulturoj. Tiamaniere, danke al Esperanto kiel lingvo-ponto, la malgrandaj kulturoj povas interligiĝi kaj konatiĝi. Ankaŭ verkistoj el tiuj landoj jam tradukitaj Esperanten, povas esperi ke ĝuste ili kaj iliaj verkoj povus eniri la mondiskalan literaturan scenejon: teorie, la Esperanten tradukita nacia verko, se bonkvalita, interesa kaj moderna, povus esti retradukita al preskaŭ ĉiu nacia lingvo de la esperantistaro.

Ĉu tio ĉi ne estas admirinda?

Do, estas tute videble ke Esperanto pere de la tradukprocezo povas esti reala kaj se ne unika, tamen signifoplena ponto inter la mondaj literaturoj.

(Prelego dum la Tutmonda kongreso de E-ĵurnalistoj en Vilnius, Litovio, 26-30.05.2008..

lom ŝanĝita ĝi estis prezentita ankaŭ dum la 1-a kongreso de serbiaj esperantistoj en Niŝka Banja, de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2008)



# Elstaraj

## LJUBICA MARIĆ (1909 – 2003)



Ljubica Marić (Kragujevac, 1909 – Beograd, 2003), komponistino, direktistino, verkistino kaj skulptistino, unika arta kreanto de la 20-a jarcento, unu el la plej signifoplenaj serbaj artistoj ĝenerale kaj la plej originala serba komponisto. „Ŝi estas la unua komponisto en muzikhistorio utiliganta la bizantan eklezian muzikon por kreado de propraj nelurgiajn verkojn. En siaj kompozicioj ŝi kreis tre originalan sintezon de la mezepoka muziko kaj de avangardaj muzikspertoj el la unua duono de la 20-a jarcento, kreinta verkojn de kortuŝa lirikeco. Ŝia muziko anoncis ekeston de postmodernismo kaj minimalismo.“ (K.D.)

La unuaj paŝoj en muziko Ljubica faris en la Muzika lernejo en Beogrado, ĉe Josip (Štolcer) Slavenski (Čakovec, 1896 – Beograd, 1955). Kiel juna Josip estis bakista laboristo, sed inspirita per melodia riĉeco de sia Intermura regiono kaj Balkano, ankaŭ per muziko de malnovaj kulturaj popoloj de Oriento, li fariĝis fama komponisto. Unue li laboris kiel instruisto pri kantado kaj muziko, ankaŭ gvidis ĥoron, en la Dua vira reala gimnazio en Beogrado, inter 1926 ĝis 1937. Poste li prelegis kiel profesoro de la Muzika lernejo (pli malfrue nomiĝonta „Mokranjac“). Pro slava spirito de lia muziko, Josipaj amikoj nomis lin „Slavenski“ (Slava). Kiam fondiĝis Muzika akademio en Beogrado li prelegis en ĝia mezlernejo, kaj laŭ li, nun ĝi nomiĝas „Josip Slavenski“.

Post la Dua mondmilito li ekestis profesoro pri komponado en la Muzika akademio.

Ljubica Marić studis (1929-1932) komponadon ĉe Konservatorio kaj Majstra lernejo en Prago (ĉe J. Suk kaj A. Hába) kaj direktadon (ĉe N. Malk kaj H. Scherchen). Samtempe ŝi ludis violonon kaj pianon. Tiutempe Ljubica Marić estis unu el la unuaj eŭropaj direktinoj, kaj direktadis en orkestroj en Ĉeĥio, Francio kaj Serbio.

Post reveno al Beograd, ŝi esploris serban popolan kaj eklezian muzikon, kaj komponis verkojn en kiuj aplikadis iujn principojn de popola muzika inventaĵo, ankaŭ moduladoj de bizanta eklezia muziko. Adeptino de l'avangarda grupo de serbaj komponistoj en tridekaj jaroj de la pasinta jarcento, Marić en sia plua kreado esence ne retiriĝis de modernaj direktoj. Konsekvenca en fundamenta stileca orientiĝo Marić siajn komponaĵojn de la lasta periodo riĉigis per tre individua lingvo ĉiam ligita kun pratempa popola arto, arkaikaj kaj filozofiaj motivoj. La komponaĵoj *Kantoj de spaco*, *Kantato por miksitaj ĥoro kaj orkestro*, samkiel ciklo *Muziko Oktoihaj* kaj *Versoj el Montara krono* por voĉo kaj orkestro - reprezentas kulminojn de la serba artmuziko, anticipintaj la novan direkton en la historio de l'eŭropa muziko.

Ŝian muzikon modele laŭdis Ŝostakoviĉ, Lutoslavski, Hába, Herman Ŝerhen, Marius Flothaus. En la 1963 jaro Ljubica Marić estis elektita por membro de Serba akademio de scienco kaj arto (SASA). Antaŭ nelonge en la Akademio estis prezentita eldono de la kodaŭtorita projekto de Ljubica Marić, akademiano Nikola Pantić kaj Dimitrije Vujadinoviĉ, kulturologo

UNESKO proklamis la jaron 2009 por la jaro de Ljubica Marić kaj Milutin Milankoviĉ.

Pribislav Marinkoviĉ



## NESUFIĈE DA GEJUNULOJ

La unua kongreso de serbiaj esperantistoj okazis inter la 1-a kaj la 4-a de majo 2008 en Niŝka Banja. La organizantoj, Serbia Esperanto-Ligo, Esperanto-Instituto kaj la urba Esperanto-societo el Niŝ, organizis diversajn aktivecojn. La partoprenantoj de la kongreso konstatis, ke dum la lastaj jaroj la Esperanto-movado en Serbio bone funkciis, sed, bedaŭrinde, inter esperantistoj estas malmulte da gejunuloj.

Dum la unua kongresa tago, post salutvortoj kaj prelego de Tereza Kapista pri la centjariĝo de UEA, estis prezentitaj du novaj libroj: **Vortaro** (Esperanto-serba kaj serba-Esperanto) de tri aŭtoroj (Adem Jakupoviĉ, Momĉilo Ocokoljiĉ kaj Marko Petroviĉ) kaj traduko de la lernolibro de Stano Marĉek "Esperanto - direktna metoda" en la serban (traduko de Tereza Kapista), nova numero de "Beograda Verda Stelo", informa kaj literatura revuo kiu, en modesta formo, jam la trian jaron

Mi salutas la intencon, ke Esperanto en Respubliko Serbio denove ekfloru kaj progresu kaj la kongreso estu ĝuste la unua ŝtupo en tio.

Montru, ke ni esperantistoj estas kiel birdo fenikso, kaj post diversaj malagrablaj kaj nekredeblaj eventoj, vi estos unu inter tiuj kiuj provos transponti ruinojn inter sudslavaj popoloj kaj esperantistoj - esperante per Esperanto.

Per Esperanto kaj pro Esperanto oni devus ripari la disŝiritajn rilatojn inter popoloj kaj esperantistoj kaj fari tion kion politikistoj jam provas celante komunan Eŭropan union.

*M-gro Radenko Miloŝeviĉ, vicprezidanto de KEL*

aperas, kaj traduko de la romano de vojvodina hungarlingva verkisto Nandor Gion al Esperanto "Salvo al nigra bubalo" (traduko de Laslo Husar).

Dum la dua tago prelegis la institutanoj: Boriŝa Miliĉeviĉ pri historio de Esperanto-movado en Serbio, d-ro Miodrag Stojanoviĉ pri utiligo de Esperanto en scienco, Zlatoje Martinov pri originala Esperanto-literaturo, d-ro Pribislav Marinkoviĉ pri tradukoj el la serba literaturo en Esperanton, magistro

Radojica Petroviĉ pri lernado de Esperanto rete, magistro Gvozden Srediĉ pri Esperanto-movado inter fervojistoj kaj Dimitrije Janiĉiĉ pri Esperanto-gazetaro. Ĉiuj prelegoj aperis en aparta kongresa numero de "Beograda Verda Stelo". Vespere en Eŭropa domo, en urbocentro de

Niŝ. estis malfermita ekspozicio pri Esperanto.

La tria tago estis rezervita por konatiĝo kun kultur-historiaj vidindaĵoj de la urbo, por ekskurso kaj komuna tagmanĝo en naturo.

La kongresanoj konkludis, ke temo de sekva kongreso okazonta post du jaroj povus esti "Edukado de instruistoj/antoj de Esperanto kaj aktivadoj por plijunigo de Esperanto-movado".

La unuan kongreson de serbiaj esperantistoj el Kroatio partoprenis Vukaŝin Dimitrijeviĉ el Split.

*Dimitrije Janičić*

(Tekstoj aperis en **Zagreba Esperantisto** 3/2008, paĝoj 92-93)

## **Kongresa Rezolucio - 2008** **Kongresna rezolucija 2008.**

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73 landoj por diskuti la kongresan temon "Lingvoj: trezoro de la homaro",

93. svetski kongres esperantista, održan je u Roterdamu od 19. do 26. jula 2008. god. sa 1875 učesnika iz 73 zemlje da razmatra kongresnu temu "*Jezici: blago čovečanstva*",

Festante ĉi-jare la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio,

Slaveći ove godine stogodišnjicu Svetskog saveza za esperanto,

Notante la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la ebligado de malsamaj aliroj al la mondo,

Beležeći važnu ulogu jezika u očuvanju znanja i kultura, i u omogućavanju raznih pristupa svetu,

Rimarkante la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimulto, kaj

Primećujući stalnu diskriminaciju jezika na svim nivoima i posebno jezikâ domorodačkih naroda i manjina, i

Atentigante pri la valoro de la facile lernebla kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol centjara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo inter kulturoj,

Ukazujĉi na vrednost neutralnog jezika esperanta koji se lako uĉi, koji je i sâm jeziĉko blago ĉoveĉanstva, i na viŝe nego stogodiŝnje iskustvo njegovog praktiĉnog koriŝĉenja kao sredstva povezivanja kultura,

Varme bonvenigas la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de Unesko en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo de ties Ĝenerala Direktoro al la kongreso,

Toplo pozdravlja odluku Ujedinjenih nacija da 2008. godina bude Meĉunarodna godina jezika, i visoko ceni inicijative UNESKO-a na tom polju, pomenute u poruci njenog generalnog direktora kongresu,

Reemfazas la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo,

Ponovo istiĉe potrebu da se dâ jednako poŝtovanje svakom jeziku, svakoj kulturi i svakom ĉoveku u svetu,

Alvokas la Esperanto-komunumon disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj, kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,

Poziva esperantsku zajednicu da ŝiri esperanto i njegove vrednosti poŝtovanja svakog ĉoveka i jednakosti meĉu svim ljudskim grupama, i time se bori protiv nestajanja jezika i kultura ŝirom sveta,

Invitas al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj kiuj laboras por konservi lingvojn kaj kulturojn kaj defendi lingvajn homajn rajtojn,

Poziva na saradnju sa svim organizacijama i organima koji rade na oĉuvanju jezika i kultura i odbrani jeziĉkih ljudskih prava,

Instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj

Podstiĉe sve da priznaju bitnu ulogu jeziĉke razliĉitosti, u vezi sa rastuĉim priznanjem bioloĉke razliĉitosti, i

Proponas al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado tra la mondo.

Predlaĝe svetskoj zajednici da nauĉno ispita ulogu esperanta u efikasnijem i praviĉnom komuniciranjju ŝirom sveta.

Tradukis al la serba:

Preveo na srpski:

Boriŝa Miliĉeviĉ

Novi Sad, 27.07.2008.

## **KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ**

En Premantura (Istrio), de la 11-a ĝis la 18-a de julio, 2008, okazis la 74. Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj. En la Kongreso partoprenis 76 geesperantistoj el dekkvar landoj. Ĉeftemo de la kongreso estis: Nevidantoj en medio - vivo en grandaj urboj kaj aŭspicianto estis Ministerio de protekto de medio de Respubliko Kroatio. Kaj la labora, kaj la kultura programoj estis tre abundaj. Ni ankaŭ, havis sufiĉe da tempo por ĝui la maron kaj ekskursi. Oni konatigis nin, i.a., kun pikado por blinduloj, pendanta keglejo. Okazis ŝakmatĉo inter esperantistoj kaj blindaj ŝakistoj el Istrio. Venkis esperantistoj. Konversacian rondon gvidis Natalija Kasimova, instruistino, nun vivanta en Germanio. Literaturan vesperon plenumis Spomenka Ŝtimec, kiu parolis pri sia verkado. Ĉiuj partoprenintoj donace ricevis sur KD, de la aŭtorino legitan, romanon "Tena".

Ni aŭskultis jenajn prelegojn:

Lino Fuĉiĉ, reprezentanto de la Ministerio tre interese parolis pri novaj leĝoj kiuj faciligas la vivon de viddifektitoj kaj disdonis la Regularon al pluraj interesiĝantoj. Pri propraj spertoj kaj opinioj pri moviĝo de nevidanta persono parolis Antun Kovaĉ kaj Nedeljka Loĝajiĉ en siaj prelegoj. Pri novfondita Centro pri moviGo parolis Mira Kataleniĉ.

Okazis ankaŭ, du kunsidoj de ĝeneralasembeo de LIBE.

La etoso estis agrabla kaj ni klopodis serĉi kaj trovi eblecojn vigligi nian movadon inter gejunuloj.

Nedeljka Ložajić

## **Rezolucio de la 74-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj**

Al

- Eŭropa blindula unio (EBU)
- Naciaj blindul-organizoj
- Esperanto-unuiĝoj de viddifektitoj
- Nevidantoj en medio

La partoprenantoj de la 74-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Premantura, Kroatio 11.-18.7.2008 kun 76 partoprenantoj el 14 landoj traktis kiel ĉeftemon la problemojn de blinduloj en grandaj urboj, precipe de memstara moviĝo. La kongreso kaj la ĝenerala asembleo de Ligo Internaciade Blindaj Esperantistoj (LIBE) akceptas jenan rezolucion:

### *Alvoko 1*

La ĝenerala asembleo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj alvokas decidfarantojn de komunumoj, ŝtatoj kaj institucioj de Eŭropa Unio en siaj decidoj konsideri aliron de viddifektitoj al edukado, profesia trejnado kaj enlaborigo, kaj tiamaniere preventi diskriminacion.

Konstruata medio devas esti sekura al ĉiuj.

La ĝenerala asembleo kun plezuro konstatas, ke Eŭropa blindula unio (EBU) konscie agadas por efektivi partoprenon en socio.

### *Alvoko 2*

La ĝenerala asembleo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj konstatas, ke lingvosciaj gejunuloj, kiuj interesiĝas pri internacieco, ne havas kontentigajn taskojn en la okupoj de internaciaj organizoj.

Ekde 1921 komenciĝinta tradicio de ĉiujaraj internaciaj kongresoj de blindaj Esperantistoj ofertas eblecon ricevi interkulturajn rilatojn kaj al partoprenantoj pretecon al internacia kunlaboro. Tial informado pri la internacia lingvo Esperanto, kaj kontaktoj kun blindulorganizoj estas necesaj.

La ĝenerala asembleo alvokas Esperanto-unuiĝojn de viddifektitoj kune kun naciaj blindulorganizoj subteni pere de Esperanto la dum jardekoj kreitan kulturon.

Pere de la revuo Esperanta Ligilo, reto de delegitoj kaj kontaktpersonoj en naciaj blindulorganizoj Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj dum periodo 2009-2012 distribuu informojn pri Esperanto-materialoj, studeblecoj, internaciaj renkontigoj kaj instigu al najbarlanda kunlaboro.

Nedeljka Ložajić

Prezidanto de LIBE

Antun Kovač

Kongresa prezidanto





# Informoj

## **SIMO MILOJEVIĆ HONORA MEMBRO DE UEA**

En la inaŭguro de la 93-a UK en Roterdamo la publiko bonvenigis per forta kaj longa aplaŭdo la decidon de la Komitato de UEA elekti s-ron *Simo Milojević* kiel Honoran Membron de UEA.

*Simo Milojević* naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje (Hercegovino) , Jugoslavio. Li esperantistiĝis fine de 1956. En la komenco de sia movada aktivado li estis sekretario de loka Esperanto-klubo, poste de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto . En 1963 li estis ĉefredaktoro de "Jugoslavia esperantisto" , poste de "La suda stelo" (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton. Post sia transloĝiĝo al Nederlando *Milojević* redaktis la revuon "Kontakto" (1970-74). En 1974 li eklaboris en la Centra Oficejo de UEA, kiel vicdirektoro (1974-80) kaj redaktoro de "Esperanto" (1974-1984). De 1983 ĝis 1995 li estis ĝenerala direktoro de UEA. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj labori kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA, de 1996 ĝis la fino de 2002, kiam li pensiĝis. Ekde la fino de 2007 li vivas en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino) .

Gradimir Kragić

## **UNU NEORDINARA KUNVENO**

Dum regula kunveno, la 18-an de aŭgusto 2008, beogradaj esperantistoj travivis, post longa tempo, kunvenon kun gastoj. Francaj kaj kroataj esperantistoj kiuj partoprenis kongreson de SAT en bulgara urbo Kazanlak – estis gastoj de la regula semajna kunveno de beograda Esperanto-societo "Radomir Klaić".

Gastoj interesiĝis pri multaj temoj: pri vivo en Serbio, pri aktiveco de esperantistoj, pri labora klaso, pri familiaj kaj propraj problemoj, pri rajtoj de virinoj kaj pri problemo kiel plijunigi la movadon. Dommastroj, ankaŭ, havas multajn demandojn por gastoj. Trideko de esperantistoj interparolis kvar horojn en tre agrabla etoso. Gastoj, cetere, dormas kaj loĝas ĉe beogradaj esperantistoj.

Mi mencias ke tio estas la unua kunveno kun pluraj gastoj el aliaj landoj post la dudekjara izoleco de nia lando (pro politikaj kaj militaj kialoj).

Dimitrije Janičić

## PRELEGO

En Banja Luka la 5-an de aŭgusto esperanto societo „La Mondo“ organizis prelegon “Brilo kaj mizero de KUBO“. Preleganto estis konata esperantisto kaj mondvojaĝanto Roberto Pontnau el Francio. Li estis en Kubo je la 2007. kaj parolis pri ordinaraj aferoj kaj ĝenerale pri vivo en la malproksima lando. La prelegon vizitis ĉirkaŭ 30 esperantistoj kaj neesperantistoj kiuj kun plezuro aŭskultis pri tre interesa lando. Je la fino de la prelego vizitantoj demandis al preleganto pri diversaj aferoj en Kubo kaj li kun plezuro respondis al ĉiu ĉeestanto. Post la prelego estis modesta koktelo dum kiu ĉiuj vigle babilis pri diversaj aferoj. S-ro Roberto lernas serban lingvon kaj kun neesperantistoj parolis en serba lingvo.

Roberto kaj du esperantistinoj el Banja Luka kune per lia aŭtomobilo vojaĝos al SAT kongreso en Kazanlak - Bulgario. Post la kongreso en Bulgario s-ro Roberto denove havos prelegon. Tiam li parolos pri nova Rusio.

La prelegon aŭskultis kaj parolis kun preleganto kaj kun prezidanto de e-societo “La Mondo”, Miĉo Vrhovac, ĵurnalistino el Sendependa gazeto (tre populara gazeto en Bosnio). Du tagojn poste en gazeto aperis teksto pri tiu okazaĵo kun foto de gasto el Francio.

Esperantistoj en Banja Luka de la 30-a de aŭgusto ĝis 6-a de septembro estos teknikaj organizantoj de Prov SUS de AIS el San Marino. Tio estos la unua studenta sesio de AIS an Bosnio kaj Hercegovino. Organizantoj esperas ke post tiu sesio Esperanto estos pli populara en Banja Luka.

Raportis Miĉo Vrhovac

Novaj libroj

## UTILA VORTARO

(Dr Pribislav Marinković i saradnici: POLIGLOTA – VIŠEJEZIČNI REČNIK, izdanje Kragulj, Beograd, 24 cm, 407 strana, ISBN 978-86-905097- 4-4 • Dro Pribislav Marinković kaj kulaborantoj, POLIGLOTO – PLURLINGVA VORTARO, eldonanto Kragulj, Beogrado, 407 p., 24 cm, ISBN 978-86-905097- 4-4)

"Kiom da lingvoj vi parolas, tiom vi validas" – oni jam delonge diris. Pro tio ĉiu nova vortaro estas tre grava, precipe se ĝi estas plurlingva.

Antaŭ kelkaj tagoj aperis en Beogrado libro – vortaro "Višejezični rečnik – poliglota" (Plurlingva vortaro – poligloto". Ĉefredaktoro kaj eldonanto estas d-ro Pribislav Marinković, konata beograda esperantisto.


Vortaro enhavas 1.260 plej frekventajn vortojn. Bazo de la vortaro estas serba lingvo, sed ĉiu vorto aperas en dekdu lingvoj. Elektro de vortoj estas rezulto de esploro de esperantisto Zlatko Tišljarić, antaŭ dudek jaroj. Tiam Tišljarić registris materialon de ĉirkaŭ 60.000 vortoj dum Esperantaj kongresoj. (Frekvencmorfemaro de parolata Esperanto, eldono Internacia kultura servo, Zagreb, 1988). El tiu materialo li elektis ĉirkaŭ 1.500 plej ofte elparolitaj vortoj. Praveco de ĉi tiu elektro donas ĵus Internacia lingvo, ĉar kongresojn partoprenis plej ofte homoj inter 20 ĝis 50 jaroj parolantaj iun de nuntempaj ekzistantaj tri mil lingvoj el ĉirkaŭ 200 ŝtatoj en la mondo.

Aŭtoroj de la vortaro, krom d-ro Pribislav Marinković (la arumana, Esperanto, germana) estas prof. dr. Marijana Dan (la rumana), Milan Bogdanović (la rusa), prof. dr. Dragana Kragulj (la franca), prof. Vesna Dimitrijević (la antikva greka kaj latina), prof. dr. Miodrag Stojanović (la novgreka), prof. dr. Bratislav Marinković (la angla), Aleksandar Crnjanski (la slovaka). Elektro de vortoj, kvankam pasis dudek jaroj, probable multe ne ŝanĝiĝis, ĉar elektro rilatas al ĉiutagaj okazaĵoj kaj vortoj.

Vortaro estis prilaborita en du partoj – unua kie estas ĉiuj vortoj en ĉiuj lingvoj. Bazo estas serba lingvo kaj ĉiu vorto havas sian numeron. En la dua parto estas apartaj registroj de ĉiuj lingvoj, kompreneble, kun numeroj. Tiamaniere estis facile trovi deziratan vorton el iu ajn el enhavataj lingvoj.

Laboro por ĉi tiu libro daŭris dek jarojn. Poligloto, certe, estas tre utila libro. En ĝia preparo estas enlaborita granda peno, sed libro povas tre bone servi al multaj homoj, ne nur esperantistoj.

Dimitrije Janičić



# Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

## Писмо – Letero

pro	-због
facile	-лако
al	-к, ка, или трећи падеж без предлога
per	-помоћу или шести падеж без предлога
pere de	-посредством
peri	-посредовати
ke	-да, што (свеза)
kiom	-колико
kiom da	-колико (особа, ствари или нечега)
tiom	-толико, онолико
tiom ĉi ili ĉi tiom	-оволико
tiom da	-толико, онолико (особа, ствари или нечега)

Kara samideano,

Mi dankas pro via letero de la dudeka de aŭgusto. Ĝi estas bela kaj facile komprenebla. Ĝi venis al mi pere de nia samideano kiu vizitis vin. Mi legas ke vi venos al Novi Sad kun viaj geamikoj per aŭtobuso. Kiom da ili estos kun vi? Kaj je kioma horo alvenos la aŭtobuso? Vi povos telefoni al mi kaj informi min je la sepa kaj duono vespere.

Bomiĉ

## Proverboj

Kiom da homoj, tiom da gustoj	-(Колико људи, толико укуса)
Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj	Колико људи, толико ĥуди
Kiom da koroj, tiom da voloј	-Колико глава, толико капа
	-Колико срдаца, толико хтења

∴

Додат на корен речи, суфикс -ај означава конкретну ствар онога што је у корену речи.

fortika	-чврст, постојан	fortikaјо	-тврђава, утврђење
porko	-свиња	porkaјо	-свињетина
manĝi	-јести	manĝaјо	-јело
trinki	-пити	trinkaјо	-пиће

∴

Насупрот њему, суфикс -ес означава својство, квалитет онога што је у корену речи.

Као засебна реч есо означава својство, особину, квалитет.

uni	-један	uniесо	-јединство
grava	-важан, тежак (болест)	gravесо	-важност
homo	-човек	homесо	-човечност, људскост

∴

Суфикс -ад означава дугу радњу или учесталу радњу из корена речи.

legi	-читати	legadi	-читати дуго или учестало
lego	-читање као појам	legado	-читање дуго или учестало
lerni	-учити уопште	lernadi	-учити дуго или учестало
lerno	-учење као појам	lernado	-учење дуго или учестало

∴

Поређење предлога се врши помоћу речца pli (више) или malpli (мање) за компаратив и plej (највише) или malplej (најмање) за суперлатив.

bone	-добро
pli bone (ol)	-боље, (више добро) (него)
plej bone	-најбоље (највише добро)

malpli bone (ol)  
malbone  
pli malbone (ol)  
plej malbone

-лошије (мање добро) (него)  
-лоше  
-горе (више лоше) (него)  
-најгоре (највише лоше)

**Поменућемо још ове изразе:**

same ... kiel  
tiel ... kiel  
ju pli ... des pli  
ju malpil ... des malpli  
kiel eble plej ...  
kiom eble plej ...  
tiom pli (bone)

-исто ... као  
-тако ... као  
-уколико ... утолико  
-уколико ... утолико  
-што је могуће ...  
-што је могуће ...  
-утолико (боље), тим (боље)

∴

(наставиће се)



# Amuzo

## ŜERCOJ

### **Malpli konataj leĝoj de Murphy**

Lumo estas pli rapida ol sono. Tial certaj personoj aspektas saĝe ĝis kiam vi aŭdas ilin paroli.

Kiu lasta ridas, pensas plej malrapide.

Nenio estas stultsekura por sufiĉe talentita stultulo.

Regulo 50-50-90: Kiam ekzistas probableco 50-50, ke io estos sukcesa, tiam ekzistas 90-procenta probableco ke ĝi ne estos sukcesa.

Pilolampo estas ujo por malplenaj pilo.

Tibio estas ilo por trovado de mebloj en mallumaejo.

Punmono estas takso pro eraro, takso estas punmono pro neeraro.

Kompilis: Adem Jakupović



## La 94-a Universala Kongreso de Esperanto

okazos en *Bjalistoko*, Pollando,

de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2009